

Sud-Rejna Kuriero

Aprilo
2014

Komuna inform-bulteno de Esperanto-Societo Basel kaj Mulhouse-Esperanto

N°54

Espace 110
FR-68110 ILLZACH
CCP 19684 F Strasbourg
mulhouse.esperanto11@free.fr



Esperanto Societo Basel
Postfach 178
CH-4005 Basel
esperantobasel@gmx.ch

*Karaj membroj, karaj
gesamideanoj, karaj legantoj,*

*Fine de januaro okazis nia
membro-kunveno, kies raportojn
vi trovos en ĉi-tiu numero.*

*En aprilo nia grupo havis la
gravan taskon organizi la prin-
tempan staĝo de nia federacio.*

*Ĝi okazis kun sukceso en
Storckensohn dank'al la kunlabo-
ro de pluraj membroj.*

*Ĉi –apude Mélanie la ĉarma
kantistino de la vespera koncerto.*

*En Espace 110 kursoj oka-
zas ĉefe marde posttagmeze.*

*Jacques proponas organizi
amikan tagon tra Mulhouse.*

*Ivo mencias la eblecon partopreni la eventojn "Vivu via strato" dum
10 dimanĉoj.*

*La verdaj fadenoj daŭre funkcias alterne en Mulhouse kaj en Saint-
Louis.*

Jam estas anoncita la aŭtuna staĝon en Sankt-Peter.



André Grossmann

Merkredo	23.4.2014	Monata kunveno : en Riehenring 131 Nicole Bérout-Focke rakontos pri Irlando
Lunde	26.5.2014	Saint-Louis Babilado nomita „La Fadeno“ ek de la 19a en la restoracio „La poste“ en Saint-Louis
Ĵaŭde	26.6.2014	Monata kunveno en Grün 80, ek de la 19a
FERIOJ		
Dimanĉe	24.8.2014	aŭ 31.8.13 Ekskurso ?
Lunde	29.9.2014	Saint-Louis Babilado „La Fadeno“ ek de la 19a en la restoracio „La poste“ en Saint-Louis
Ĵaŭde	23.10.2014	Monata kunveno en Riehenring 131 Babilado kaj ludoj
Lunde	24.11.2014	Saint-Louis Babilado „La Fadeno“ ek de la 19a en la restoracio „La poste“ en Saint-Louis
Ĵaŭde	27.11.2014	Programo en Riehenring 131 Ek de la 20a15
Sabate	13.12.2014	Zamenhofa festo en Svislando

Nicole Bérout

KOTIZOJ KAJ ABONOJ POR 2014-2017

La kotizo al Mulhouse-Esperanto inkluzivas sendon de nia loka bulteno **Sud-Rejna Kuriero**. Ĝi ebligas partopreni la aktivaĵojn de nia asocio kaj donas la rajton voĉdoni okaze de Membro-kunveno.

Sed ankaŭ eblas aboni nian bultenon SRK sen membriĝo al nia asocio.

Jen ĉi-sube la kotizoj kaj la abonoj por la 3 venontaj jaroj.

Jaro	Kotizo	Abono	Kolora ekzemplero
2014	6,50 eŭroj	6,50 eŭroj	14 eŭroj
2015	6,50 eŭroj	6,50 eŭroj	
2016	6,50 eŭroj	6,50 eŭroj	

Sprache und Identität

Sprache und Identität sind eng miteinander verknüpft. Sprachen beeinflussen die Identitäten und Kulturen von Individuen. Die Identität (persönliche Identität) unterscheidet ein Individuum nach verschiedenen Merkmalen wie Alter, Religion, ethischer Zugehörigkeit (kulturelle Identität) von anderen Individuen. Sie ist das Produkt von dynamischen Beziehungen zwischen Individuen und deren sozialem Handeln. Sprache ist ein Merkmal (Aspekt) der Identität. (L'identité est en effet le produit des relations dynamiques entre l'individu et les pratiques sociales de tous les jours. Amin Maalouf, auteur libanais vivant à Paris)

Betrachtet man die Bedeutung von Sprache, so umfasst diese weit mehr als nur sprechen, hören, lesen und schreiben. Sie drückt die Gedanken und Gefühle durch Zeichen (Zeichen-Sprache), Gebärden (Gebärden-Sprache) und Laute aus. Mit ihr und durch sie sind wir uns vertraut, denn in ihr fühlen, denken, erfahren, erinnern, hoffen und träumen wir. (Brockhaus)

Gleichzeitig ordnet die Sprache die Individuen sozialen Gruppen zu und grenzt diese von einander ab. Dies wird besonders deutlich an Beispielen wie Jugendsprache oder Fachsprache von einzelnen Berufsgruppen. Die Sprache stellt ein wichtiges Element innerhalb des kulturellen und sprachlichen Austauschs zwischen Menschen dar. Hinzu kommen Dialekte und Mundarten, die die Bevölkerung geographisch unterteilt.

Heutzutage kommen Menschen unterschiedlicher Sprachen und Kulturen viel häufiger untereinander in Kontakt, vor allem durch die Globalisierung der Märkte. Einerseits ist die Sprache Kommunikationsmittel zwischen Menschen, die innerhalb einer oder verschiedener Gruppen leben, andererseits können Individuen durch sie auch eine Identität erhalten.

Konkret: wo man früher dachte eine Muttersprache und eine Brückensprache (Englisch /Esperanto) reichen, neigt man heute dazu, noch eine Landessprache hinzuzufügen (vor allem für den Beruf).

Fo

Agad-raporto de Mulhouse-Espéranto por la jaro 2013

Kursoj por progresantoj okazis ĉiun mardon aŭ vendredon alterne ĉiu-semajne en Espace 110. La nombro de la gelernantoj variis inter 5 kaj 2.

La kunvenoj "verda fadeno" regule okazis alterne en Mulhouse kaj St Louis la lastan lundon de ĉiu monato. Ankaŭ partoprenis membroj el Baze-lo. Estis kreita dissendolisto: verda-babilejo por tiuj kiuj ŝatas rete babilii. Nun estas sep personoj enskribitaj en la listo.

En la 8a de januaro okazis la tri-reĝa festo. Krom kelkaj membroj de nia asocio venis ankaŭ gastoj de Germanio. Ĉiuj povis gustumi la tortojn (4!) kaj la vinon !

La Ĝenerala Membro Kunveno okazis la 5an de februaro en espace 110.

La 8an de marto nia asocio partoprenis al la Festo de lingvoj en la Uni-versitato de Alta Alzaco.

Pluraj membroj de la asocio partoprenis al la regiona staĝo de Esperanto en Benoite-Vaux organizita de Groupe Esperanto Meuse.

Majo, junio kaj julio (en tute dekfoje) kelkaj membroj deĵoris ĉe "Vivu via strato". En ĉiu dimanĉo matene, ĉe la bordo de l'Ill okazis la festo. Okazo por multaj babiladoj kun scivolemaj pasantoj.

La 13an de junio invitis Maria Fournier en sian domon en Hindlingen por festi la finon de la lernojaro de Mulhouse-Esperanto. La menuo: frititaj kar-poj. Dudek personoj ĉeestis inkluzive gastoj el Nord-Irlando.

La 16an kaj 17an de novembro ni partoprenis en Bédéciné en Illzach kaj samtempe en Ungersheim ĉe foiro pri ekologio kaj justa komercado.

La Zamenhof festo estis organizita de nia grupo la 14an de decembro. En la programo: urba vizito, komuna manĝo en MTL kaj prelegoj kun pres-kaŭ 30 partoprenantoj.

Partoprenis ankaŭ membroj de nia asocio al :

- la UK semajno en Rejkjaviko: 3 partoprenantoj
- la kunveno en Frajburgo: 5 partoprenantoj
- la esperanta-semajno en Lloret del Mar: 2 partoprenantoj
- la Bavelo regiona Seminario en Speyer, Germanio.

SRK aperis 4 foje.

Nia retejo <http://mulhouse.esperanto.free.fr> daŭre bone funkcias.

Niaj dissendo-listoj por facile komuniki:

- mulhouse-esperanto@yahoogroupes.fr
- verdababilejo@googlegroups.com

Yves Stutz

Ĝenerala Asembleo de Mulhouse-Espéranto januaro 2013

La Ĝenerala asembleo okazis en Espace 110 la 31an de januaro 2014.

Ĉeestantoj: André Grossmann, Denise Heinrich, Robert Kueny, Edmond Ludwig, Jacques Pineda, Alain Sarrasin, Yves Stutz, kiel observantoj Fernando Nkanu Kinkani, Alexis lia amiko.

Senkulpigataj: Bernard Behra, Anne Vernet, Bertrand Wick.

Akcepto de la lasta raporto post legado fare de la prezidanto.

La sekretario legis la agad-raporton de la jaro 2013. Kaj poste la kasisto (kaj ankaŭ prezidanto), prezentis la finanĉan raporton de 2013 kaj la membro-liston de tiu ĉi jaro.

Ambaŭ estis unuanime akceptitaj.

Finiĝis la mandatoj de: Alexandra Mussabini, Robert Kueny, Anne Vernet. Ĉiuj estis unuanime reelektitaj

La asembleo elektis la estraron por la venonta jaro:

Prezidanto:	André Grossmann
Sekretario por la franca:	Robert Kueny
Sekretario por Esperanto:	Yves Stutz
Kasisto:	André Grossmann
Eksteraj rilatoj kaj propagando:	Jacques Pineda

Diversaĵoj:

– Kurso por komencantoj: Ĝi ne okazas, pro manko de studentoj. Jacques demandis kial ne venis komencantoj. Pluraj respondoj: ni ne sufiĉe klopodas pri la lingvo, la personoj lernas per la reto, ni ne konservas la kontakton kun la personoj, kiujn ni renkontas dum diversaj manifestacioj. Andreo proponis al Jacques konsideri la eblecon krei kurson en Maison du Temps Libre. Jacques konsentis

- Kurso por progresantoj: Ili kutime okazis aŭ marde aŭ vendrede laŭ la ebleco de la partoprenantoj. Ili estis kutime 2 aŭ 3 gelernantoj. Ni uzis Tinĉjon por studi, aŭ diversajn tekstojn.

En novembro, Yvette falis sur betona ŝtuparo ĉe espace 110, venante al la kurso. Ŝi vundiĝis ĉe la brako.

- Jacques interkonsentis kun la estro de la restoracio La Fonderie por traduki menuojn en Esperanton.
- Verda fadeno: Bone funkcias.
- Sud-rejna Kuriero: Inter nia membroj kaj abonantoj 5 preferis retan version kaj 17 por la Bazela grupo. Tial necesas eldoni 50 ĝis 60 pa-perajn ekzemplerojn. Kelkaj koloraj ekzempleroj de la bulteno estas presitaj per la hejma presilo de Andreo. Sed tio estas pli da laboro kaj pli kosta. Eventuale eblas proponi pli altan kotizon por koloraj ekzempleroj.
- Nia retejo: <http://mulhouse.esperanto.free.fr>: regula ĝisdatigo.
- Dissendo-listoj:
 - por la membroj de la asocio, kiuj posedas ret-adreson :
mulhouse-esperanto@yahooGROUPES.fr
 - por la volontulo de la verda babilejo:
verda-babilejo@GOOGLEGROUPS.fr

Estontaj agadoj:

- Festo de la lingvoj: La eksa dekanano Yann Kerdiles konata de Edmond ne plu estas dekanano. Ni ankoraŭ ne konas la sintenadon al Esperanto de la nova dekanano, kaj ĉu ŝi invitos nin al la Festo de la lingvoj.
- Bédéciné kaj Ungersheim: Ŝajnas ke ne estas sufiĉe da deĵorantoj por ambaŭ manifestacioj. Ĉio-kaze ni privilegios Ungersheim.
- Vivu via strato: ni daŭrigu.
- Amika tago: Jacques proponas tion. Andreo rimarkigas ke necesas eviti samtempan proponon de Ginette. Edmond proponas kunigi tiun manifestacion kun la jarfina-tagmanĝo. Tiu-okaze necesos antaŭvidi la manĝon tagmeze, kaj posttagmeze promenadon.

Aliaj diversaj:

- Yves proponas partopreni al la Foire écologique de Colmar. Li informigos pri la ebleco.
- Partopreno de Fernando al festivalo en Colmar: Je joue dans les champs du monde. La asocio helpas lin laŭ ĝiaj eblecoj.

Ivo, korektita de Andreo

Pagintaj membroj ricevas aparte la finanĉan raporton

Amika tago tra Mulhouse kaj komuna manĝo por nia grupo la 14an de junio 2014

Jacques Pineda proponas al ni organizi amikan tagon tra Mulhouse por la 14a de junio. La planita manĝo en restoracio estos samokaze la **komuna manĝo de nia grupo Mulhouse-Esperanto**.

Jen la proponita programo.

- ◆ 9a45: rendevuo por ĉiuj ĉe la parkejo "Kinépolis". La parkado kostas nur 2 eŭrojn por unu aŭtomobilo kun tram-biletoj iro-reveno por ĉiuj kunveturantoj.
- ◆ Trama trairo de la urbo ĝis la stacidomo kaj akcepto de pliaj partoprenantoj. La trajno el Freiburg kaj Müllheim alvenos je la 10a11 Tie estos la forir-punkto de nia promenado.
- ◆ Promenado laŭ-longe de la kanalo kaj rondiro, kiu elvokos la miluzan laboristan historion.
- ◆ Entute ĝi daŭros proksimume 1h45 sed tre trankvile. (ni ne traigos la historan centron, kiun ni jam vizitis, eĉ se tre rapide)
- ◆ 12a ni manĝos paeljon preparitan de la mastrino de la kafejo "le Printemps". Je nia dispono estas la granda salono, kiun ni povos eventuale ornami per "esperantaj koloroj", la pli malgranda ĉambro estos ankaŭ je nia dispono (tie kutime ni konvenas) por eventuale prezenti librojn aŭ kelkajn aliajn aferojn
- ◆ kostoj: 20 eŭroj: paeljo plus deserto
- ◆ 25 eŭroj: paeljo kaj deserto kaj aperitivo kaj vino
- ◆ (mi antaŭvidos kelkajn amuzetojn)
- ◆ post la manĝo ni repromenos tra la parko "Salvator" ĝis la placo "de la Reunion" kie ni povos viziti senpage la historan muzeon
- ◆ poste kun nia trambileto ni iros al la parkejo por trovi niajn aŭtojn
- ◆ tre grava: mi devos koni la nombron de la partoprenantoj ple malfrue unu semajnon antaŭe, do antaŭ la 4 de junio. necesos antaŭpagi.

Jacques

Pliaj informoj aperos ĝustatempe en nia retejo:

<http://mulhouse.esperanto.free.fr>

Krome vi trovos en ĝi fotojn pri nia lasta staĝo kaj informojn pri la venonta en Sant Peter, Germanio.

75a Regiona Staĝo de Esperanto

esperanto
France-Est

4 / 5 / 6-ajn de aprilo
2014

En la Feriejo Le Torrent
68470 STORCKENSOHN


Organizita de

MULHOUSE  ESPERANTO

La ĉi-jara regiona staĝo de Esperanto France-Est estis organizita de nia grupo. Yves Stutz kuraĝe iniciatis la organizaĵon en Storckensohn, kvankam mankis al li spertoj pri niaj staĝoj kaj ties organizaĵo. Antaŭ 14 jaroj ni jam sukcesis ĝin okazigi en Storckensohn kune kun TAKE. Tamen lastjare tio ne eblis.

La domoj Le Torrent estis plene je niaj disponoj kaj tute taŭgis por nia staĝo.

Ni havis je dispono grandan salonon por vesperaj programoj, krome ĝi oportune taŭgis por prezenti la multajn librojn de nia libroservo.



Ursula fiere montras la ĵus akiritan T-ĉemizon de Thierry Saladin

Por la prelegoj kaj la kursoj troviĝis salonoj en la domoj "Fougère" kaj "Bruyère".

La granda manĝo-salono povis esti uzata kiel akceptejo kaj por la kurso C.

Vendrede vespere Thierry Saladin prezentis la temon "Esperanto komuna lingvo en Eŭropo" Li proponis taŭgajn T-ĉemizoj kun sloganoj en diversaj lingvoj. Poste sekvis prezentado de fotoj pri la antaŭ-kongreso en Islando.

La knajpon diligente kaj lerte prizorgis Robertson. Ĝi estas grava parto de la programo por ĝui bongustajn bierojn kaj amike babilu antaŭ ol definitive enlitiĝi por la nokto.

Sabate matene estis proponita vizito al la milita tombejo Vieil Armand aŭ Hartmannswillerkopf.

Pluraj aŭtoj veturis vice al tiu loko, kie Edmond atendis por gvidi la grupon. Tiu vizito estis dezirata de pluraj partoprenantoj, ĉefe memore al la terura unua mondmilito okazinta antaŭ 100 jaroj.



La ekskursantoj troviĝas antaŭ la fama tombejo kaj ties muzeo Vieil Armand aŭ Hartmanns-willerkopf, starigita post la unua mondmilito.

Tie Edmond klarigis pri la diversaj historiaj eventoj, kiujn Alzaco suferis en la du lastaj jarcentoj.

Je alteco de 956 metroj super de la alzaco ebenaĵo je rekta distanco je 7 km de Thann kaj 6 km de Cernay. Tie ĉefe en 1915 okazis teruraj bataloj kun dudek-kvin-mil mortintoj.

Eblis vidi restaĵojn de la tranĉeoj francaj kaj germanaj kaj monumenton honore al la mortintoj.



Restas la bedaŭrinda fakto, ke la instigantoj diversflankaj de tiu ĉi milito sukcesis atingi rekordon: neniam ĝis nun oni mortigis dum milito tiom da homoj! Tiun rekordon ebligis la moderniĝo de la mortigomaŝinoj! Kaj tiu amasbuĉado tiom surprizis, ke oni post ĝi volis kredi, ke tiu ĉi milito estos la lasta!!! Ni scias, ke 21 jarojn poste rekomenciĝis la katastrofo! Kaj de tiam ne ĉesis la militoj en la mondo! Kia malhoma homaro!



Post la reveno el la matena ekskurso kaj alveno de novaj partoprenantoj, ĉiuj troviĝis en la manĝo-salono. Poste estis anoncigitaj la detaloj de la posttagmezaj programoj. Unue estis prezentitaj en la granda salono novaj libroj akireblaj en la libro-servo.

Hannes Larsson prelegis pri violonoj, pri ties fabrikado kaj evoluo en la historio. Li aŭdigis al la ĉeestantoj mallongajn ekstraktojn de famaj violonistoj en la du lastaj jarcentoj.



La paroligan kurson por progresintoj gvidis Edmond Ludwig kun deko da lernantoj. Roberto Kueny gvidis la kurson de progresantoj. Dume Ginette Martin zorgis pri veraj komencantoj.

Antaŭ la vespermanĝo Roberto proponis deklamadon de kelkaj fabloj de "La Fontaine", kiujn li aparte ŝatas, kaj kiuj kaptis la atenton de la ĉeestantoj.



La kulmino de la vespero estis la koncerto de Mélanie, 18-jara liceanino el la region de Chalou-ŝe-Saono. Ŝia akompananto kaj gvidanto Lorenzo Tomezzoli enkondukis la vesperon. Per komputilo li prezentis sur granda ekrano la tekstojn de la kantoj en Esperanto, en la franca kaj ankaŭ en la itala. Estis agrable tiel sekvi la kantojn de Mélanie kaj samtempe ĝui ŝiaj agrablajn voĉojn. Multaj el la kantoj estis tre romantikaj kiel: *Tango de amo*, *Kaptita estas via kor'*, *Valora koncerto*, *fulma enamiĝo*,



La publike entuziasme aŭskultis tiun interesan koncerton.

Lu kanto trafe argumentas pri Esperanto: "Forlasi la ŝafaron..." Lorenzo tradukis aŭ verkis plej multajn kantojn en Es-

peranto. La lastaj kantoj estis en la franca kaj en la itala. Ambaŭ artistoj ricevis varman aplaŭdon pro tiu mirinda vespero.

La vespero finiĝis ĉe la knajpo, kiun kompetente prizorgis Roberto.



Dimanĉe matene la prelegoj kaj kursoj rekomenciĝis en la koncernaj salonoj. Antaŭ la tagmanĝo Roberto iniciatis inviton al aperitivo ekster la domo, en agrabla kaj simpatia etoso. Estis proponitaj blanka alzaca vino kaj kugelhupfo.

Ĉe la fino de la staĝo, Edmond ne forgesis danki la kontribuantoj kaj organizantoj por tiu sukcesa staĝo.

Forlasi la ŝafaron

(L'Exilé du Charollais)

TANGO

musique : Gilbert Drigon
paroles : Lorenzo Tomezzoli



1
se vi , hazarde opinias
ke iu lingv' internacia
en nia mondo, havas rajton
nur se ĝi celas milit-traĵton
ju pli danĝera estas ĝi,
sukceson havas, ja , des pli...
vi certe en mezbona mondo
neniam zorgos pri respond'

R
forlasi la ŝafaron
gustumi de l'kulturo la nektaron
ne zorgi pri la klaĉo
kiu devenas de la lingv-malplaĉo
de uloj nesciantaj
ke Esperanto vere taŭgas pli
por la homar'
ol lingvo de nacio
kiu regadas en la naiva mond'
jen estas por ni granda celo
kaj al stulteco, la respond'

2
se vi, pri via propra vivo
nun pensas inda la motivaĵon
rigardi trans la horizonto
kaj iri ĝis la vera fonto
de la saĝec' por la homar' ...
jam estos vi ekster erar' :
neniam la mezbona mondo

atingos vin per fia ond'

R
forlasi la ŝafaron
gustumi de l'kulturo la
nektaron
ne zorgi pri la klaĉo
kiu devenas de la lingv-
malplaĉo
de uloj nesciantaj

ke Esperanto vere taŭgas pli
por la homar'
ol lingvo de nacio
kiu regadas en la naiva mond'
jen estas por ni granda celo
kaj al stulteco, la respond'

3
celante la lingvo-propagon
tre alte ŝatos vi la agon
de tiu Esperant-amanto,
zorganta eĉ pri diletanto...
ĉar tiu, kiu per bonfar'
alportas revon al homar'
sukcesas en mezbona mondo,
ke venkas trafa la respond'

R
forlasi la ŝafaron
gustumi de l'kulturo la nektaron
ne zorgi pri la klaĉo
kiu devenas de la lingv-malplaĉo
de uloj nesciantaj
ke Esperanto vere taŭgas pli
por la homar'
ol lingvo de nacio
kiu regadas en la naiva mond'
jen estas por ni granda celo
kaj al stulteco, la respond'

Lorenzo Tomezzoli

ret.adreso: irnzc@neuf.fr

retejo: <http://kaprinido.perso.sfr.fr>

Aperis en la ĵurnalo l'Alsace la 19an de aprilo 2014

Espéranto Un stage sous le signe de l'amitié franco-allemande

Une rencontre internationale entre espérantophones d'Alsace et d'Allemagne a eu lieu récemment au centre Le Torrent, à Storckensohn.

Le premier week-end d'avril a réuni, au centre de séjour Le Torrent à Storckensohn des espérantophones d'Alsace et du pays de Bade. Mais la réputation de ces rencontres – il s'agissait du 75e stage d'Espéranto France-Est – avait attiré des espérantophones des environs de Dijon, ainsi que des membres des groupes d'espéranto de Stuttgart et de Aalen.

La rencontre débuta vendredi soir avec une conférence du Dr Thierry Saladin, de Montpellier sur les méthodes de promotion de la Langue internationale et s'est poursuivie le samedi matin par une excursion au Vieil Armand, un lieu symbolique pour les deux pays.

Congrès mondial à Buenos Aires

De retour à Storckensohn, les participants ont rejoint les différentes salles pour des cours de perfectionnement et – pour les espérantophones chevronnés – le cycle de conférences animé par l'ingénieur finlandais Hannes Larsson, spécialiste de la résistance des matériaux employés dans les satellites et les centrales nucléaires qui a fait une carrière internationale. Dans l'une des conférences on parla surtout de mathématiques et tout le monde comprit rapidement que notre société ne fonctionnerait pas sans les mathématiques ! Mais ce génial touche-à-tout a également ravi ses auditeurs par de passionnantes explications sur les violons, leur fabrication, leur utilisation, tout en faisant écouter des petits extraits des meilleurs violonistes des deux siècles derniers. Cet infatigable retraité a également annoncé qu'il ferait une série de conférences au mois d'août lors du congrès mondial d'espéranto à Buenos Aires.

Le service de librairie a proposé une large gamme d'ouvrages: de la littérature originale et des traductions. L'accent avait été

mis sur les traductions d'auteurs – surtout contemporains – des pays de l'Est (Albanie, Croatie, Kosovo, Pologne).

Pas de rencontre internationale entre espérantophones sans soirée récréative animée avec brio par la jeune lycéenne Mélanie, alors que la « knajpo » tenue par Roberto a permis de bavarder autour d'un bon verre. Et Dieu sait qu'on bavarde en « espérantie » où la barrière des langues n'existe pas ! Les participants ont été ravis de l'accueil à Storckensohn et ont profité du beau temps, avant leur départ dimanche après-midi, pour faire une promenade dans ce magnifique village de montagne.

Une rencontre réussie grâce au dévouement du secrétaire du groupe Mulhouse-Espéranto. Un nouveau rendez-vous a été donné pour la 17-19 octobre à Sankt Peter en Forêt Noire.

EN SAVOIR PLUS Le site <http://mulhouse.esperanto.free.fr/> est à la disposition des lecteurs qui souhaitent s'informer sur la langue internationale.

76a regiona staĝo de

esperanto

France-Est



36-a BAVELO-
Seminario

17 - 19 Oktobro 2014
Domo Maria Linden-
berg, Sankt Peter

La monto Lindenberg estas unu el la grandaj fortolokoj en la Nigra Arbaro. Super la valo Dreisamtal oni rigardas al la monto Feldberg kaj al la vere altaj montoj en la Suda Nigra Arbaro. En la okcidento - se oni bonŝancas - oni vidas la vozezojn. Tiu ĉi loko kiel neniu alia invitas al konsciiĝo, al retrorigardo al la tempo de antaŭ 100 jaroj, kiam komenciĝis la Unua Mondmilito. Kadre de diversistemaj prelegoj Ed Borsboom, Bernhard Eichkorn kaj Edmond Ludwig per tralupea rigardo al la sorto de unuopaj homoj alproksimigos al ni la tiamajn okazaĵojn.

Aldone al tio la pejzaĝo de la natura parko Suda Nigra Arbaro instigas, portempe sin liberigi de la ĉiutagaj rapideco kaj premo kaj de la bruo de la urboj. Eblecoj por ekskursoj al la ĉirkaŭaĵo kaj al la lago Titisee subtenos tion.

Wallfahrtskirche Maria Lindenberg

Kiel kutime ni ne neglektos la lingvan flankon. Krom la "klasikaj" kursoj por komencantoj kaj progresintoj ankaŭ ĉi-foje estos paroliga kurso kaj la prelegoj de la t.n. bukeda kurso. En internacia etoso kun multaj partoprenantoj el najbaraj landoj el lingvolernado rapide fariĝas lingva travivaĵo. Kompletigos la aranĝon instiga vespera programo.



Foto Sankt Peter: Wikimedia Commons

Foto Pilgrima Preĝejo Maria Lindenberg: Joergens.mi/Wikipedia, permesilo CC-BY-SA-3.0 (de)

Programo de la BAVELO-Seminario 2014

Kursoj kaj petataj prelegantoj

- A - Kurso por komencantoj 1 (Frank Vogler)
- B - Kurso por komencantoj 2 (Johannes Mueller)
- C - Paroliga Kurso - Konversacio/diskutado pri interesaj temoj (Edmilson Lima Serejo)
- D - Bukeda Kurso por progresintoj kaj spertaj parolantoj; celataj temoj:
 - 100 jarojn post la "Granda Milito" (Ed Borsboom)
 - Max Josef Metzger - Kiel la milito faris el li pacaktiviston (Bernhard Eichkorn)
 - Kiel vilaĝo disŝiriĝis pro la milito (Edmond Ludwig)
 - Kiel akvo de'l rivero - La verkisto Raymond Schwartz (Edmond Ludwig)
 - Novaĵoj el la libroservo (Jean-Luc Thibias)
 - Retrorigardo al la pasinta jaro per bildoj (Ursula Niesert)

Turisma programo, i.a.

- (A1) Promenado al St. Peter (pitoreska vojo, ĉ. 3 km) AŬ
- (A2) Vizito ĉe unu el la multaj abelistoj de la regiono; poste komune gvidado tra St. Peter kun Bernhard Eichkorn.
- (B) Ekskurso al la lago Titisee.

Horaro

Vendredo, 17-a de oktobro

- 15:00 - 15:30 Alvojaĝo de frualvenantoj
- 15:30 - 17:00 Ekskurso por frualvenintoj
- 17:00 - 18:00 Alveno, akcepto, distribuado de ĉambroj, pliaj informoj
- 18:00 - 19:00 Bonveno kaj vespermanĝo
- 19:00 - 20:00 Kursoj - parto 1
- ekde 20:15 Vespera programo (interkonatiĝo, filmo) poste trinkejo ("knajpo")

Sabato, 18-a de oktobro

- 07:30 - 08:30 Matenmanĝo

- 09:00 - 10:15 Kursoj - parto 2
- 10:30 - 11:45 Kursoj - parto 3
- 12:00 - 13:00 Tagmanĝo
- 14:00 - 17:00 Ekskursoj (St. Peter, lago Titisee, vidu supre)
- 17:00 - 18:00 Citro-koncerto (planata)
- 18:00 - 19:00 Vespermanĝo
- 19:00 - 20:15 Kursoj - parto 4
- ekde 20:15 Muzika vespera programo poste trinkejo ("knajpo")

Dimanĉo, 19-a de oktobro

- 07:30 - 08:30 Matenmanĝo
- 08:00 - 09:00 Diservo (Bernhard Eichkorn)
- 08:30 - 09:30 Forlasado de la ĉambroj
- 09:30 - 10:30 Kursoj - parto 5
- 10:30 - 11:30 Kursoj - parto 6
- 12:00 - 13:30 Tagmanĝo, adiaŭo

Sankt Peter estas vilaĝo en la natura parko Suda Nigra Arbaro (Südschwarzwald), ĉ. 20 km oriente de Freiburg. La seminario okazos en la Domo Maria Lindenberg, seminario kaj ripozejo de la diocezo Freiburg, situanta iom ekstere de la vilaĝo.

Haus Maria Lindenberg ((vidu pli malsupre ĉe Alvojaĝo)

Lindenbergstraße 25

79271 Sankt Peter

Tel: 0 76 61 / 9 30 00

Fax: 0 76 61 / 93 00 33

Alvojaĝo per trajno:

Veturo ĝis la ĉefstacidomo de Freiburg, de tie per buso tra Glottertal al St. Peter. Alternative per trajno al Kirchzarten, post per buso al St. Peter.

Alvojaĝo per aŭto:

Sur aŭtoŝoseo A5 (Frankfurto-Bazelo), elirejo Freiburg Nord. Tra Glottertal al St. Peter, de tie restas ankoraŭ ĉ. 3 km ĝis Lindenberg (simple sekvu la ŝildojn).

La mapo montras la pozicion de gastejo sur la monto Lindenberg - Domo Maria Lindenberg estas najbara konstruaĵo samloka.

La kotizo rajtigas al elektita kurso. Ĝi ne repageblas. La aliĝo validas post alveno de mono:

Pagebla per ĝiro al CCP Esperanto France-Est 1997 72 W Nancy per franca ĉeko al Esperanto France-Est sendata al André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM ret-adreso: andreo.ag08@free.fr

Aliĝilon bonvolu sendi al:

S-ino Inge SIMON,

Brünner Str. 20

DE-73431AALLEN

Tel. 00.49-7361/ 360 615, Inge.

Simon@esperanto.de



Haus Maria Lindenberg
Lindenbergstraße 25
79271 Sankt Peter

Telefono: 0 76 61 / 9 30 00
 Telefakso: 0 76 61 / 93 00 33

Kostoj:

La aliĝkotizo estas 30 €
 10 € por gejunuloj ne pli ol 26-jaraj.

Aldoniĝos laŭkaze la kostoj por tranoktado/manĝado en la seminariejo resp. por biletoj dum la ekskursoj.

Kostoj por du tagoj inkluzive de manĝado en la Domo Maria Lindenberg:

2 tranoktadoj
 en dulita ĉambro: 100 €,
 en unulita ĉambro 130 €.

Aliĝilo al la Bavelo/EFE-seminario en Sankt-Peter

S-ro S-ino	Familia nomo	Persona nomo
1		
2		
Adreso		
Telefono:		
Ret-adreso:		
Mi pagas la sumon..... al Esperanto France-Est		

Mi / ni partoprenos la kurson kaj programon

A B C D

Mi / ni interesiĝas pri la programero por fru-alvenantoj: Jes Ne

Mi alvenos per aŭto
per publikaj transportoj

Mi / ni volas tranokti en la Domo Maria Lindenberg

en unulita ĉambro

en dulita ĉambro

Manĝoj:

Mi / ni volas manĝi vegetare

Alergio kontraŭ

Sen manĝo

Nombro da manĝoj	vendrede	sabate	dimanĉe
matenmanĝo			
tagmanĝo			
vespermanĝo			

Eblas aliĝi elektronike ĉe la retejo : <http://esperanto-bw.de/seminario-eo> :

Verdaj fadenoj por amike babilu nur en Esperanto



Fine de marto ni kunvenis en Saint-Louis en kafejo de la poŝto.

Ankaŭ venis membroj de la bazela grupo por kune ĝui nian babiladon nur en Esperanto.



Venonta lundaj kunvenoj okazos laŭ jenaj datoj

5an de majo (anstataŭ la 28an de aprilo) en Mulhouse en la kafejo Le printemps, rue du printemps.

26an de majo la restoracio "de la Poste" 10 strato de Huningue en Saint Louis

30a de junio en Mulhouse en la kafejo Le printemps, rue du printemps.

"Vivu via strato" dum 10 dimanĉoj en Mulhouse

Yves Stutz refoje proponas al vi partopreni en tiu evento, kiu okazos dum 10 dimanĉoj de la 25a de majo ĝis la 27a de julio, ĉiun dimanĉon de la 10a30 ĝis la 12a30.

Tie estas metita je nia dispono tablo kaj seĝoj. Tie eblas informi kaj babilu kun la preterpasantoj pri Esperanto kaj krei kontaktojn. Tamen la principo estas, nenion vendi, nenion aĉeti. Ĉio estu senpaga.

Se vi deziras surloke manĝi, prefere kunportu viajn piknikaĵojn kaj ĝuu la naturon kaj la printempan veteron.

La diversaj deĵoradoj estos proponitaj pere de nia dissendolisto.

Festival Vita'Rue

Tous les dimanches, du 25 mai au 27 juillet 2014, soit durant 10 dimanches consécutifs, nous donnons rendez-vous à tous ceux qui désirent commencer leur journée en favorisant l'initiation et la découverte d'activités de remise en forme (sports co et activités de remise en forme) et d'expression artistique (arts plastiques, loisirs créatifs, ...). C'est aussi l'occasion de partager un moment privilégié avec ses voisins, entre amis et en famille le tout dans un écrin de verdure.

Nia Kalendaro 2014

aprilo 2014	4 - 5 - 6 8 - 11 - 15 28, ŝanĝita al 5a de majo	Nia regiona staĝo okazos en Storckensohn laŭ programo en ĉi-tiu numero Kursoj por progresantoj en Espace 110 de la 15a ĝis la 16a30 verda fadeno laŭ propono de Jacques de la 19a ĝis la 20a30 en la kafejo Le Prin-
majo 2014	5 6 - 13 - 20 - 27 25 26	verda fadeno laŭ propono de Jacques de la 19a ĝis la 20a30 en la kafejo Le Printemps: 7 rue du printemps Mulhouse Kursoj por progresantoj en Espace 110 de la 15a ĝis la 16a30 Vivu via strato de la 10a30 ĝis la 12a30 Verda fadeno laŭ propono de Bertrand de la
junio 2014	1 - 8 - 15 - 22 - 30 14 3- 10 - 17 - 24	Vivu via strato de la 10a30 ĝis la 12a30 Amika tago kun vizito de la urbo kaj komuna tagmanĝo kun la grupo de Mulhouse-Espéranto Kursoj por progresantoj en Espace 110 de la 15a ĝis la 16a30
julio 2014	6 - 13 - 20 - 27	Vivu via strato de la 10a30 ĝis la 12a30

Aktualigitaj informoj aperos daŭre ĉe:

<http://mulhouse.esperanto.free.fr>

Niaj membroj ankaŭ estos informitaj per nia dissendo-listo:

mulhouse-esperanto@yahoogroups.fr

Alia dissendo-listo estas rezervita al retaj babiladoj:

verda-babilejo@googlegroups.com

Sud-Rejna Kuriero aperas kvaronjare. Ĝin redaktas por Esperanto-Societo Basel: Hanspeter SENN, Paradieshofstr. 164, CH-4054 Basel kaj por Mulhouse-Esperanto: André Grossmann, 5, rue des Pyrénées, FR-68390 Baldersheim. Ĝin eldonas Mulhouse-Esperanto.

Printempaj koloroj



STORCKENSOHN

